Esperanto Asocio en ĈSR
Praha II. Malá Štěpánská 7,
telef. 33014.

Marto 1953.

Informa cirkulero n-ro 1.

Esperantistoj ! Aŭdu, pripensu, komprenu, ekagu !

Kio estas nun la plej grava en la mondo ?
La grandioza batalo por la mondpaco !

Kio estas nun la plej grava en nia patrujo ?
La energia marŝo al socialismo !

Jen la plej gravaj taskoj je kiuj devas kunlabori sindoneme ĉiuj homoj de bona volo.

Meti Esperanton plene en servojn de ĉi tiuj du noblaj celoj estas nia arda deziro kaj aspiro.

Ĉiuj esperantistoj devas fine kompreni, ke ne la por-esperanta laboro, sed la per-esperanta akcelado de la du grandegaj taskoj estas la ĉefaĵo.

Individuoj, kiuj ne komprenas tion, devas esti ĉiutage konvintataj por ke ili fine komprenu. Societoj, organizaĵoj, kiuj obstine staras flanke, devas forvelki, ĉar ili malhelpas, baras la vojon.

La sorto de nia Asocio estas en viaj manoj. Estas necese, ke vi firme staru kiel fidelaj membroj ĉe via asocio, kiu donas al vi sube la plej necesajn informojn. Baldaŭ okazos la jarkunveno, kie vi aŭdos detalajn informojn pri ĉio cetera kaj kie ni povos esperеble proponi al vi novan agadplanon.

Vi, kiuj entuziasme plenumas la porpacan kaj porsocialistan laboron, daŭrigu kun pliaj fortoj. La ceteraj kunhelpu kun plena sindonemo. Ju pli frue, des pli bone !

Honoron al via komuna laboro !

## Pri la estonteco de la Esperanto-movado en Ĉeĥoslovakio.

---

La delegitaro, elektita dum la tutlanda laborkonferenco en Praha, por interveni ĉe la ministro por informoj pri la plua ekzistado de nia landa centro kaj pri la Esperanto-gazetoj, ricevis la direktivon, ke la ministro ne sentas sin kompetenta por pritrakti tiun ĉi problemon, kaj estis rekomendite pritrakti ĝin kun la kultur-propaganda fako de la Centra Komitato de la Komunista Partion en Ĉeĥoslovakio.

Merkrede, la 6.de februaro la delegitoj pritraktis tie la tutan aferon kun k-doj Buřível kaj Filipec.

La delegitoj klarigis la situacion de nia movado kaj ĝiajn specialajn taskojn, kies karakteron ne estas eble kompari kun la karaktero de aliaj nacilingvaj societoj kaj kluboj.

Per abunda dokumenta materialo, koncerne la porpacan kaj porsocialistan laboron de niaj esperantistoj, la nomitaj kamaradoj plene konvinkiĝis pri la grava rolo, kiun ludas Esperanto sur tiu ĉi kampo..

Eluzinte ĉi-favoran situacion, k-do Burda, kiel la ĉefa parolanto, rekte prezentis jenajn postulojn de la delegacio:

Permesi la pluan ekziston de nia E.-centro kaj konsenti pri la daŭra eldonado de niaj gazetoj.

Ĉar la k-doj Buřível kaj Filipec ne estis rajtigitaj mem solvi la problemon, oni preparos resumon de la traktado, transdonotan al la elektitaj organoj de la partio, kiuj post interkonsiliĝo kun Ĉeĥoslovaka komitato de pacdefendantoj kaj eble kun la Tutmonda packonsilantaro, kiu nun sidejas en Praha, al kiu estas invitotaj ankaŭ niaj delegitoj, eldonos definitivan decidon.

Post du kaj duonhora ambaŭflanka diskuto, k-do Buřível donis al ni konsilon daŭrigi intertempe nian fruktodonan laboron. Kaj ni, /la red./ aldonas, ke ne ekzistas kaŭzo por iu ajn malespero inter niaj esperantistoj, sed male, ni rekomendas ankoraŭ pli intensive meti Esperanton en la servon de la tutmonda pacdefendo kaj propagando de socialismo.

Se ĉiu el ni aktive staros sur sia loko kaj kapablos defendi nian aferon laŭ proleta vidpunkto, nia venko estas garantiota. RB.

. . . . . . O . . . . . .

---

LIGILO 1933, 1934, 1936, 1937, 1938.

Valora legaĵo - kelkaj kompletaj jarkolektoj haveblaj po Kčs 40.- ĉe librovendejo de EAĈSR

---

"El Popola Ĉinio", - diversaj n-roj po Kčs 5.-

"Esperanto-Servo", - diversaj n-roj senpage.

Mendu ĉe EAĈSR

---

..................................

ĈU VI JAM PAGIS LA JARKOTIZON ?

SE NE,

BONVOLU NE FORGESI ! ! ! ! !

..................................

KREDU MIN SINJORINO . . .

MIRU - PENSU - RIDU.

La jenaj samideanoj ricevis por la biblioteko de sia loka klubo unu el la supre notitaj libroj senpere de la eldonejo. Bonvolu tuj konfirmi al HEROLDO de ESPERANTO :

J. Vondroušek, Brno - V. Slaný, Ostr. - D-ro F. Vaněk, N. Role - F. Vrchota, Cheb - F. Pytloun, Hr. Kr. - J. Reiser, Plzeň - T. Kilián, Třebíč - J. Škorpil, Tábor - Ing. K. Fanta, Liberec - V. Růžička, Děčín.

# Organizaj informoj

Dum ĉiuj lokaj grupoj enviciĝis en diversajn amasorganizaĵojn, la centro mem, nia Asocio, atendas ankoraŭ decidon de la kompetentaj instancoj pri la maniero de sia plua ekzisto.

Intertempe la centro plue funkcios kune kun sia oficejo en Praha.

La mankantan gazeton ni anstataŭigos per cirkuleroj informantaj la membrojn pri ĉio necesa.

Ni vokas do al niaj membroj, ke ili restu fidelaj kaj al la afero kaj al la centro. Ni konservu la centron kiel eble plej longe.

La membroj bonvolu renovigi siajn kotizojn.

Kotizoj. Laŭ la opinioj aŭditaj de diversaj flankoj, la komitato de la Asocio lasos la kotizon senŝanĝe. Tamen ĝis la tempo, kiam ni denove povos eldonadi gazeton presitan, ni petas sendi al ni sole parton de la jarkotizo laŭ la jena skemo:

kotizo normala 50 Kčs, junularo 30 Kčs, familiano 15 Kčs.

La kluboj akceptas kotizojn en la ĝisnuna alteco, deprenas de la kotizoj siajn 25%, sendas al la Asocio laŭ la supra skemo, kaj la reston ili tenas sur speciala konto por sendi ĝin al la Asocio en la okazo, ke la gazeto denovo aperos.

Gazeto 1950 kaj 1951. Por ke novaj membroj havu legaĵon kaj povu konatiĝi kun la movado dum la lastaj du jaroj, ili povas ricevi - se ili plipagas 50 Kčs jarkolektojn 1950 kaj 1951.

Tiu aranĝo estas tre valora por la novaj membroj, ĉar tiamaniere ili ricevas ambaŭ vortaretojn / esperanta-ĉeĥan kaj ĉeĥa-esperantan /, plus Juna Korespondanto de Julie Šupichová, kun tekstoj en ambaŭ lingvoj.

Lokaj informoj. Ni tre petas, ke oni daŭrigu nin informi pri ĉiu entrepreno esperantista, kiu okazis : ekspozicioj, paroladoj, kursoj ktp. Indiku la nombron de la ĉeestintoj, la nomon de la aranĝanto, parolinto, instruanto, nomu metodon aŭ lernolibron de instruado ktp.

Entreprenoj preparataj. Koncizan informon pri ili ni povos publikigi nur se ĝi ĝustatempe venos al ni !

Esperanto-monumento en Ostrava estos inaŭgurita en marto.

Esperanto-muzeo en Kopřivnice estos oficiale inaugurita en majo. Informojn donos Rud. Zanáška, Jiráskova 442, Kopřivnice.

Someraj kolegioj estas denove preparataj. Pli detalaj informoj venonte.

Esperanto-seminario en Olomouc. Aliĝis 59 p. krom Olomouc-anoj. La venontaj prelegoj:

30.3. Interesaĵoj en la esp. gramatiko /esp. Rud. Hromada/
Ĉeĥoslovaka Esp. Movado /esp., la sama/
6.4. Problemoj de la lingvo internacia /esp. Ing. L. Krajíc/.

ZAMENHOF-PORTRETO
Ornamo de ĉiu esperantista kunvenejo. La librovendejo de EAĈSR povas liveri fotografaĵon 24x30 cm afrankite por Kčs 60.-

Novaj
ESPERANTO-GLUMARKOJ PRIPAGAJ
Folio kun 50 ekz. / 5 diversaj desegnoj de Bartošík en ĉiu folio/ kostas Kčs 10.-
Liveras librovendejo de EAĈSR

## Librovendejo de EAĈSR ofertas

| Helpiloj por studo: | Kčs |
|---|---|
| Lad. Krajíc: Učebné texty pro kursy /2.50/ | 20.- |
| J.V.Dolinský: Velká slovenská učebnica medzin. reči esperanto /2.50/ | 65.- |
| E.V.Tvarožek: Esperanto v 14 úlohách /pro slováky/ /2.50/ | 30.- |
| V.Pochoč: Praktika konversacio /1.50/ | 15.- |
| Dr. St. Kamarýt: Ellerni 1-12 | 10.- |
| E.E.Collinson: Esperanto a jeho kritikové | 2.- |
| Dr. St. Kamarýt - Dr. T.Pumpr: O zkouškách z esperanta | 10.- |
| Ivan Sarafov: Legolibro por superaj kurson kaj memklerigo /4.-/ | 110.- |

| Vortaroj: | |
|---|---|
| J.V.Dolinský: Malý slovník esper.-slovenský a slov.-esper. /2.50/ | 60.- |
| J. a K.Filipové: Velký slovník česko-esperantský /11.-/ | 390.- |

| Diversaĵoj: | |
|---|---|
| M.Majerová: Urbo sub signo de fajro /2.50/ | 30.- |
| Elin Pelin: Elektitaj rakontoj /2.50/ | 20.- |
| Elin Pelin: La familio Gorak /1.50/ | 12.- |
| Ivan Vazov: Vagabondoj /2.50/ | 40.- |
| K.Marx kaj F.Engels: La Komunista Manifesto /1.50/ | 30.- |
| Svaz národů o esperantu /iom difektita/ | 4.- |
| J. a K.Filipové: Kantareto /2.50/ | 45. |
| Teksto de kantoj, prezentitaj dum Esperanto-kongreso en Brno | 6.- |
| Vendita fianĉino / multobligita teksto | 10.- |
| Lerneja reformo en Ĉeĥoslovakio -- senpage | - |

| Propaganda materialo: | |
|---|---|
| Aliĝilo al Esperanto-kurso 100 ekz. /4.-/ | 35.- |
| Atesto pri kursfina ekzameno | 4.- |
| Propaganda afiŝeto multkolora 1.50 aŭ | 3.- |
| Kartona afiŝeto /1.50/ | 5.- |
| Propaganda afiŝo 41x30 cm - kun libera spaco por anonco de kurso, prelego ktp. | 2.- |
| Stacidoma tabulo lada ESPERANTO-INFORMO, uzebla ankaŭ por klubejo /6.-/ | 100.- |
| La sama, iomete difektita /6./ | 50.- |
| Geografia karto de ĈSR sur dubla poŝtkarto - kun teksto pri naturbelaĵoj de ĈSR 10 ekz. /1.50/ | 20.- |
| La sama geografia karto kun kantotekstoj " | 20.- |

| Skribmaterialo: | |
|---|---|
| Leterpapero kun koverto - 10 ekz. /1.50/ | 10.- |
| Aerpoŝta leterpapero kun koverto - 10 ekz. /1.50/ | 15.- |
| Poŝtkarto kun Esper.-emblemo 10 ekz. | 5.- |
| Poŝtkarto kun portreto de Zamenhof /Bartošík/ | 1.- |
| Novjara poŝtkarto de Bartošík | 1.- |

| Glumarkoj: | | |
|---|---|---|
| | Esperanto - řeč zítřka - 10 ekz. | 3.50 |
| | Pripacaj /Bartošík/ 5 diversaj desegnoj - 50 ekz. | 10.- |
| | | 30.- |
| Emajlita ŝildeto: ESPERANTO PAROLATA 14x5 cm /4.-/ | | |
| Insigno: Verda stelo sur blanka fono /afrank./ | | 12.- |

Al la prezo aldonu afrankon, notitan inter krampoj.
Kiam ne estas notite, tiam minimume 80 helerojn.